

Kontaktoj

Prezidanto de EASA kaj Redaktoro de Bona Espero
kaj Gautenga Regiono:

J Cloete, jcloete@icon.co.za 011-782-5807

Vic-Prezidanto kaj Kaba Regiono:

M aŭ H von Blottnitz hvb@mweb.co.za 072
179 2994

Sekretario kaj eksterlandaj kontaktoj kaj Kwazulu-
Natala regiono:

J Kohler kohlerj@webmail.co.za 083 559 3156


Kasisto kaj Ĉefdelegito de Universala Esperanto-
Asocio kaj Kaba Regiono:

C Beckford, 43 Fairview Crescent,
cbeckford@telkomsa.net

Eksterlandaj kontaktoj kaj Gautenga regiono:

A von Blottnitz vonblottnitz@icon.co.za 012 667 4120

BONA ESPERO



**Revuo de la Esperanto-
Asocio de Suda Afriko
Numero 1
2004**

La Redaktoro

Kontribuaĵojn, prefere maŝinskribitajn, aŭ sur diskoj en "Word Perfect" aŭ "MS Word" formato, oni sendu al la redaktoro:

Julian Cloete
Poŝtfako 2636
CRESTA 2118
Respubliko de Sud-Afriko
jcloete@icon.co.za

Ĉi tiu revuo iras al la membroj de la Esperanto-Asocio de Suda Afriko (EASA). Interŝanĝe por aliaj revuoj, ĝi estas havebla de la kasisto. Nemembroj povas aboni, skribante rekte al la kasisto:

S-ro C Beckford
43 Fairview Crescent
MILNERTON RIDGE 7441

La Nacia Komitato de EASA

La ĝenerala adreso de EASA estas:

S-ro O Sher
75 Bronkhorststrato
GROENKLOOF 0181

Prezidanto: J Cloete
Vic-Prezidanto: M von Blottnitz
Sekretario: J Köhler
Kasisto: C Beckford
Aliaj komitatoj: O Sher, A von Blottnitz, B
Londoni, E Bylongo, B

Nyemya,

J Katunda.

- 2 -

La malapero de alia gazeto - Fonto

Rezulte de kriza financa situacio komence de 2004, la literatura revuo FONTO (Brazilo), kiu devus eniri sian 24-an jaron, dumlonge ne povis aperi. Kelkaj eĉ jam supozis ĝin morta.

Tio estus grava kultura perdo por nia Internacia Lingvo, ĉar FONTO estas unika: skole kaj politike sendependa, 12 numeroj jare, kun pluraj famaj nomoj sed ofte ankaŭ kun novaj talentoj.

Nun tamen, la numeroj januaro/februaro kaj septembro/oktobro (Belartaj Konkursoj de UEA) estas presotaj por baldaŭ forvojaĝi al la abonantoj. La ceteraj numeroj, kiuj ĉiam ekspediĝas en duopoj por ŝpari sendokostojn, iom post iom devos sekvi.

Antaŭ la fino de 2004 ni esperas, ke ni rekaptos la kutiman ritmon.

Novaj abonoj eblas je UEA-konto bays-f - kun samtempa retroŝta averto pri la pago al gerrit.en.madzy@planet.nl. Ĉiu jarkolekto, ankaŭ de la pasintaj jaroj, kostas po 30 euxroj.

Ĉe eldonejo FONTO - kiel kutime - plu aperos novaj valoraj libroj.

Gerrit Berveling
redaktoro de FONTO.
"gerrit.en.madzy" <gerrit.en.madzy@planet.nl>
el [tejo]

fonto: ret-info

- 35 -

La pastro predikis pri la graveco de la geedziĝo je la okuloj de Dio, kaj de tempo al tempo amikoj aŭ familianoj kantis por la geedziĝontoj. Dume okazis interpretado inter la angla kaj la svahila, kaj foje la franca. La pastro petis Elisee kaj Elizabeton promesi sin unu al la alia kaj ili interŝanĝis orajn ringojn. Ili subskribis la edzlibron, kaj la pastro deklaris ke ili lege geedziĝis. Kompreneble la paro kisis kun granda aplaŭdo de la alspektantoj.

Amikoj kaj familianoj gratulis ilin, donante donacojn kaj gratulkartojn antaŭ ol s-ro kaj s-rino Byelongo elmarŝis al apuda halo, kie invitataj gastoj guis manĝaĵon kaj sukron. Tie mi, nome de la EASA komitato kaj eksterlandaj amikoj gratulis al ges-roj Byelongo en Esperanto dum la frato de Elisee, Anzuruni, tradukis la mesaĝon al la svahila lingvo. Tiel Esperanto estis parto de la ceremonio.

Post la manĝo la gastoj disiĝis sed la geedzoj kaj kunaro vojaĝis automobile al la Botanika Ĝardeno, kie oni longe kaj multe fotis. La botanika ĝardeno ja estis tre bela, sed la beleco de la paro estis pli!

-Johan Kohler

Enhavo

El la redaktorejo	4
Novajo el Eŭropo	5
Novajo el Sud-Ameriko	11
Novajo el Afriko	12
Novajo el Azio	14
EASA Marta subkontinenta kongreso	15
Protokolo de la 41a Jarkunveno de EASA	23
Pri la regiono de Suda Kivu, en Kongo	
Kaj pri la junularo de la Kongo	26
La Juda Kalendaro	30
Edziĝo ĉe iu Mbembe	33
La malapero de alia gazeto - Fonto	35

Nia oficiala interretadreso estas:
<http://www.esperanto.za.org/>

Ekzistas du Hejmpaĝoj pri Esperantaj Aferoj en Afriko:
perso.wanadoo.fr/eric.coffinet/Afrika_Agado.html kaj
ankaŭ www.uea.org.



Estas mia persona kulpo ke Bona Espero ne estis preta pli frua en la jaro. Mi ofte trovis ke la tempo mankas por ĉion, kion mi volas fari.

Tamen, ĵen la eldono por 2004. Bedaŭrinde ĉi tiu estas la sola eldono por la jaro.

Pri la movado en Sud-Afriko: post la Masuka kongreso apud Pretoria, la Gautenganoj kunvenis ĉiu-monate. La Kaba societo ankaŭ kunvenis, kvankam Harro kaj Magali estas eksterlande. Ni planas kongreseton en Marto 2005, kaj la legantoj aŭdos pli pri tiu afero baldaŭ.

-Julian Cloete
Novembro 2004

- 4 -

Edziĝo ĉe iu Mbembe

de Johan Kohler

La titolo de tiu ĉi artikolo memorigas de artikolo aperinta en la unua numero EKDO Bulteno antaŭ kelkaj jaroj: Naskiĝo ĉe iu mbembe, verkita de Elisee Byelongo. Tiam li klarigis la naskiĝceremonio de la gento Bebe de Demokratia Respubliko de Kongo - lia gentgrupo. Nun estas mia ŝanco rakonti pri edziĝo ĉe la gentgrupo Mbembe, sed ĉi-foje ĝuste pri tio de Elisee Byelongo mem.

La edziĝo inter Elizabeto kaj Elisee okazis en la centra Baptista Eklezio en Durbano, sed antaŭ tio jam okazis ceremonio en Tanzanio. El Sud-afriko tien vojaĝis Elisee dum pluraj tagoj kaj eĉ travivis busakcidenton, pro kio li enhospitaligis dum du tagoj, lime de Mozambiko.

Li vojaĝis por venigi la fiancinon al Sud-afriko. Post kiam ili du alvenis, ili loĝis malkune en Durbano ĝis al dato de la geedziĝo.

Je la mateno de la ceremonio, ambaŭ alvenis malkune ŝoforita en tre luksa automobilo. Elizabeton akompanis junaj knabinoj kaj virinoj, kaj kun Elisee venis kuzaro.

Ekde ilia alveno (kaj dum la preparado antaŭ tio) ĉe-estis fotografisto kaj vidbendigisto kiu kaptis ĉion por la foraj familianoj kaj por la estonteco. En la preĝejo eksidis la gastoj ka oni komencis kanti, kun gitaroj kaj

En horo estas 1080 Ĥalakim skribita 1080p. En Ĥelek estas 76 Regaim skribita 76m. Unu Ĥelek egalas al $3\frac{1}{3}$ sekundoj. Unu rega egalas al 5/114 sekundoj.

En la Hebrea la nomoj de la tagoj ekde Dimanĉo estas unua tago, dua tago, ktp. Nur la sepa havas apartan nomon – Ŝabat.

La plej granda nevaria unuo de la kalendaro estas la semajno fiksita per la sep tagoj, kiuj finas per Sabato.

Tradicie la juda monato egalas al 29d 12h 793p. Ĉar luna monato egalas al proksimume $29\frac{1}{2}$ tagoj la dudek monato komencante per Tiŝrei alternas inter 30 kaj 29 tagoj. Por kompenci por la 793 Ĥalokim la dua monato Ĥeŝvan, kiu kutime havas 29 tagoj foje havas 30 kaj la tria monato Kislev kiu kutime havas 30 foje havas 29.

En ĉiu ciklo de 19 jaroj estas sep superjaroj. Do la ciklo konsistas el 235 monatoj aŭ 6 939d 16h 535p. Se oni dividas per 19 sunjaro egalas al 365d 5h 997p 48m. La superjaroj estas la 3a, 6a, 8a, 11a, 14a, 17a kaj 19a de la ciklo. Ĉiu Hebrea dato korespondas kun civila ĉiu 19 jaroj – eble kun diferenco de unu tago. Mi naskiĝis la 1939-10-13an. La Hebrea dato estis 30 Tiŝrei 5700. 1958-10-13 estis 29 Tiŝrei 5719. 1977-10-13 estis 1 Ĥeshvan 5738. 1996-10-13 estis 30 Tiŝrei 5757.

-Oskaro Sher

Novaĵo el Eŭropo

Esperanto malakceptita

Voĉdono pri Esperanto en la Eŭropa Parlamento

Karaj geamikoj,

Bonvolu pardoni mian ĝisnunan silenton. Oni ja voĉdonis hieraŭ en la Eŭropa Parlamento en Strasburgo kaj oni ja malakceptis la amendon 7-an de Dell'Alba, kiu menciis Esperanton. Mi ne pli frue skribis, ĉar mi esperis povi doni al vi kelkajn ciferojn, sed bedaŭrinde mi ankoraŭ ne povas, ĉar la voĉdona sistemo estis per manlevo, kaj kiam la prezidanto komprenas, ke estas klara plimulto, laŭsxajne, oni ankaŭ ne nombras la voĉdonintojn kaj raportas nur pri la malaprobo. Ni atendas pliajn informojn, sed estas klare ke la amendo ne estis akceptita.

Tion pluraj el ni supozis pro la rezultoj en la komisiono (14 kontraŭe kaj 12 pore), sed la evento estis same historia, ĉar la unuan fojon la Eŭropa Parlamento en la pleno devis alfronti la temon.

Mirinda estis la reago de EU-aj esperantistoj, eĉ supera je tio, kion mi mem atendis. En kelkaj landoj oni kontaktis ĉiujn unuopajn eŭropajn parlamentanojn. Mi scias pri Danlando, Francujo kaj Svedujo. Povas esti ke tio estis farata ankaŭ en aliaj

landoj, pri kio mi ne scias. Mi rimarkis konsiderindan agadon en Britujo, Irlando, Germanujo kaj Italujo. Mi certas ke agado estis ankaŭ en Hispanujo kaj Aŭstrujo.

- 5 -

Mi ne scias pri aliaj landoj, sed tio tute ne signifas ke agado ne okazis. Tio estas nur manko de informoj miaflanke kaj espereble aliaj kompletigos la bildon.

Ĉio ĉi montras, ke ni ne timas alfronti la plej altajn instancojn de EU, kaj ke ili, ne ni, estas en defenda pozicio. Frazoj de la speco: "Mi teorie favoras vin, sed oni devas agnoski, ke la angla...." ofte aperis en la respondoj de parlamentanoj. Ĝi ankaŭ montras, ke eŭropaj esperantistoj kiam ili devas agi rekte por Esperanto, povas kaj volas fari tion.

Ni ne forgesu, ke en kelkaj landoj okazas rektaj prezentoj de esperantistaj partioj. Neniu scias, ĉu ili pravas, aŭ ĉu ni pravas, kiuj preferas agi pere de la tradiciaj partioj. Neniu havas la magian formulon por triumfigi Esperanton. Ni ne forgesu, ke baldaŭ okazos granda tuteŭropa manifestacio en Strasburgo, kiu espereble signos novan puŝon de la agado por Esperanto en ĉi tiu kontinento. Bondezirojn al ĉiuj ĉi tiuj iniciatoj. Ĉiu portas sian brikon aŭ sian rokegon.

Estas tasko nia, de la Esperanto-organizaĵoj, kaj unuavice ĉi-kampe de Eŭropa Esperanto-Unio, gvidi la eŭropajn esperantistoj al tiaj agadoj.

Mi aparte dankas la prezidanton de EEU, Sean O'Riain, kiu, malgraŭ siaj momentaj taskegoj en

En la pratempoj atestantoj, vidinte la novan lunon, venis al la Sanhedrin (Ĉefkortumo) en Jerusalemo. Devis esti almenaŭ du atestantoj. Oni pridemandis ilin aparte kaj ankaŭ kontrolis kontraŭ sekreta formulo. Se kontenta la Sanhedrin deklaris, ke estas Nova Monato kaj ili bruligis fajrojn sur la montoj. Poste kiam ŝerculoj nekorektatempe ekbrilis fajrojn la Sanhedrin uzis mesaĝistojn.

Komitato de la Sanhedrin agordis la sun- kaj lunjarojn. Ili havis astronomiajn ciferojn transdonitajn. Kiam post tri jaroj la 11 tagoj sumiĝis pli ol 30 tagojn ili proklamis aldonan monaton – Adar 2. Ili enŝovis ĝin antaŭ Nisan por ke Pasko okazu printempe.

Ili ne nur uzis la astronomiajn ciferojn. Ili ankaŭ observis, ke printempo malfruas. La signoj estis

- Hordeo ankoraŭ ne maturiĝis
- Fruktoj sur arboj ankoraŭ ne bone kreskis
- Vintra pluvo ankoraŭ ne haltis
- Vojo ne sekiĝis por la pilgrimantoj
- Kolomboj ankoraŭ ne estis plumhavaj

Do la Sanhedrin uzis tri faktoroj por deklari superjaron – astronomiaj ciferoj, relegiaj postuloj por Paskoj kaj naturaj kondiĉoj.

En la kvara jarcento Hillel II malkaŝis, kiel kalkuli la kalendaron.

La juda diurno komencas kaj finiĝas kiam videblas tri mezgrandaj steloj. Tio validas por Sabatoj, Fest- kaj Fasttagoj. Por celoj de la kalendaro la tago komencas kaj finiĝas je la 18:00 lau jerusalema tempo. 18:00 nomiĝas Horo 0 aŭ 24 skribita 0h aŭ 24h. La diurno konsistas el 24 horoj kakulitaj 1, 2, 3, ...24 ekde 19:00. Noktmezo estas 6h kaj tagmezo 18h, 14:00 20h, ktp.

Berlino pro la irlandia

- 6 -

LA JUDA KALENDARO

(Oskaro Sher prepares ĉi tiun artikolon por la Masuko festo.)

Ekde la tempo de la Biblio la juda kalendaro dependas, kaj de la ciklo de la suno, kaj de la ciklo de la luno. La monatoj dependas de la luno. Kiam estas nova luno komencas nova monato. Jaro kutime konsistas el 12 monatoj. La sezonoj dependas de la suno. La Biblio postulas, ke Pasko, kiu okazas meze de la monato Nisan devas esti en la Israela sumero, kaj la festo, kiu kromnomiĝas rikoltfestoj devas esti en la Israela aŭtuno.

Tiel la Juda Kalendaro estas lunsuna. Ĝi diferencas disde la civila kalendaro, kiu havas nenian rilaton al la luno kaj disde la Islama, kiu havas nenian rilatan al la suno. La Islamaj festoj vagadas tra la sezonoj. La Islama kalendaro havas ciklon de 33 jaroj. La juda Kalendaro estas komplika ĉar ĝi devas agordi la du postulojn. Sunjaro havas 365 tagoj. Dekdu lunaj monato egalas al 354 tagoj. Do mankas 11 tagoj en unu jaro.

- 30 -

prezidanteco de EU, partoprenis rekte la kampanjon per mesaĝoj en la irland-gaela al la irlandaj parlamentanoj kaj subtenis min, por ke mi agu iusence kiel oficisto de EEU aldona al la Brusela Komunikad-Centro, kiu daŭre sekvis la aferon surloke.

Pluraj konkretaj taskoj estas nun antaux ni en ĉi tiu kampo: la agado okaze de la eŭropaj elektoj (pri kiu baldaŭ vi ricevos indikojn de EEU tra la Brusela Komunikad-Centro), novaj legxproponoj, kiuj estas nun pristudataj, kaj laste kontinenta referendumo, permesota de la nova eŭropa konstitucio, pri lingva libereco por ĉiuj lingvoj kaj por Esperanto en Eŭropo.

Mi ne povas ne mencii la esperantiston Ranieri Clerici, kiu estis la ŝlosila rilatanto kun la eŭropa parlamentano, kiu prezentis la amendon, kaj kiu nun estas pristudanta novan leĝproponon prezentotan al la nova parlamento post la elektoj. Ranieri estas tre modesta, sed eble baldaŭ li mem konsentos aperi publike.

Grandan dankon al ĉiuj agintoj! Vi redonis al mi la fieron esti ankaŭ eŭropa esperantisto.

fonto: ret-info

- 7 -

Kontakto inter landoj

Sabaton la 10-an de aprilo 2004, okazis, unuafoje en la historio de Esperanto, parola kunveno inter Parizo kaj pluraj aliaj urboj en la mondo, de Sudameriko al Japanio.

fonto: ret-info

Adiaŭo al famaj esperantistoj Princz kaj Arnaudov

Kun funebra koro ni sciigas, ke la 10-an de aprilo 2004 pro korataktado forpasis Oszkár PRINCZ, ĉefsekretario de Hungaria Esperanto-Asocio, iama estrarano de UEA.

La 31-an de marto 2004 forpasis elstara bulgara esperantisto Petko Petrov ARNAUDOV (1931-2004), multjara prezidanto de Esperanto-societo "Radio" (Pazarĝik), ĉefdelegito de UEA, prezidanto de Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, redaktoro de "La Matematikisto", honora membro de la Asocio de Bulgaraj Matematikistoj kaj de Bulgara Esperanto-Asocio, aŭtoro de pluraj libroj.

fonto: ret-info

Mia frato kaj mi mem perdis nian patron kaj estis devigitaj fuĝi pro tiuj konfliktoj. En najbara hejmo loĝis iu pastro el tutsi gento. Iun tagon, alvenis kelkaj mayi-mayi kiuj forprenis kaj mortigis lin. Post semajno, ankaŭ ĉe ni alvenis tutsi militistoj. Tiam ili vinkis batalon kaj jam kontrolis teritorion. Ili nur malfermis forte la pordon kaj eniris la ĉambron de miaj gepatroj. Dume, mi estis kun mia frato en nia ĉambro. Ni subite aŭdis laŭtan bruon de niaj gepatroj. Mia frato kaj mi saltis tra fenestro kaj ni fuĝis la tutan nokton. Ni unue kaŝiĝis arbaren. Poste ni daŭre forfuĝis. Fine ili mortigis nian patron.

Tiu travivaĵo estas komuna al multaj aliaj junuloj el Orienta Kongo, kaj multaj tial serĉis rifuĝon en Sudafriko. Bedaŭrinde estas malfacile vivi kiel rifuĝinto en Sudafriko. Ne temas nur pro malfacilaĵoj de fremduloj. La ĉefa problemo estas por trovi laboron. Konganoj ofte estas devigitaj fari laboron, kiu ne estas dezirinda, ekz. gardi aŭtojn kaj domojn nokte aŭ tage, sen paŭzo, escepte dimanĉoj. Salajro nur ebligas kontribui monon por partigi malgrandan du-ĉambran loĝejon kun du pliaj familioj.

Tamen, tiuj kiuj laboras estas ankoraŭ la plej bonŝancaj. Inter la rifuĝintoj kelkaj ne laboras ĉar ili ne estas sufiĉe kleraj kaj ne kapablas daŭrigi sian edukadon pro manko da subteno. Ĉe sudafrikanoj, vivo sen laboro estas iu elemento kiu kausas krimon. Multaj ŝtelistoj estas menciitaj. Eĉ por honestaj homoj, vivo sen laboro estas tre malfacila. Kiel Marjorie Boulton skribis en "Faktoj kaj fantazioj", "vivo sen laboro, vivo sen honoro".

Benjamin Nyemya.

Junularo interesiĝas pri studoj kaj pluraj deziras atingi altajn edukadojn (universitato). Ekzistas ses universitatoj, ĉu privataj ĉu ŝtataj, en la provinca ĉefurbo Bukavu.

Bedaŭrinde, mia regiono tre suferis kaj daŭre suferas pro interetnaj konfliktoj. Jam de pluraj jarcentoj, Kongo gastigis rifuĝintojn el Ruando, aparte de la Tutsi gento. Kelkaj loĝis en la vilaĝo de Minembwe, distrikto de Fizi, aliaj en Uvira kaj aliaj en Goma kaj Kalemio. Tiuj Tutsi-oj, kiuj vivis kiel bovistoj, iom post iom integriĝis en Kongo kaj konsideris sin kiel Konganoj. Ili eknomiĝis „Banjamulengoj“ ĉar ili rifuzis nomiĝi laŭ ilia vera kaj genta nomo el la devena lando Ruando.

Post jarcento la tutsi gento el Ruando kaj Burundo, inkluzive de la tutsiaj rifuĝintoj en ekz. Ugando kaj Kongo, provis rekuniĝi por trovi kontrolon de la regiono – kaj ŝajne de Orienta Kongo. Tial, aldone al la civila milito en Ruando kaj Burundo, la Tutsioj planis ekbatali kontraŭ Kongo.

En 1996, supraj landoj ekmilitis kontraŭ la reĝimo de S-ro prezidanto Mobutu. Komence, la orienta landparto estis plej celita. Do tutsi gejunuloj kiuj fuĝis al Kongo ĉiuj iĝis militistoj por batali kune kontraŭ la konga armeo. Aliflanke kelkaj Konganoj tuj iĝis mayi-mayi (grupeto da militistoj) kiuj batalis kontraŭ Tutsiaj ribelantoj (Ruando, Burundo, ktp). Ĉiuj multe mortigis popolojn.

- 28 -

Eŭropa Bunto

La 1-an de majo 2004, la Eŭropa Unio plilarĝiĝos je 25 landoj. Ĝi transiros de 12 al 21 oficialaj lingvoj, kiuj reprezentas nur parton de la lingva kaj kultura diverseco de la diversaj EU-landoj. Por atentigi pri tiu eksterordinara kultura heredaĵo, la manifestacio Eŭropa Bunto okazos kelkajn tagojn poste, dimanĉon la 9-an de majo 2004, en Strasburgo. La oficiala retpaĝo de la manifestacio www.europa-bunto.org aktuale disponeblas en 42 lingvoj. La programo de EUROPA BUNTO nun estas difinita : ĉirkaŭ tagmezo, okazos koncerto de la tuluza kantisto JoMo, fama ĉe la Guinness-libro de Rekordoj kiel kantisto en la plej granda nombro da lingvoj. La parado ekos je la 14-a horo de la Place de l'Universite kaj finiĝos ĉirkaŭ la 17-a antaŭ la Eŭropa Parlamento. La tuto estos kompletigita de deklaroj far la diversaj delegacioj venintaj el la tuta Eŭropa Unio. Buntaj banderoloj en ĉiuj lingvoj kaj amasinformaj surprizoj iniciatitaj de la delegacioj estas programitaj. Kelkaj dekoj da asocioj jam anoncis sian partoprenon. Pluraj kunveturadoj kaj busoj organiziĝas tra Eŭropo por ebligi al partoprenontoj iri al la manifestacio.

Eŭropa Bunto
fonto: ret-info

- 9 -

Latva kaj Litovo

La 18-an de marto en la Domo de Latva Societo de Rigo en latva lingvo okazis prelego "Al la malnova membro de Latva Societo de Rigo Rudolfs Libeks - 150". Kolektiĝis proksimume 50

aŭskultantoj, inter ili multaj esperantistoj, ĉar Rudolfs Libeks (05.03.1854, Prauliena, Latvio - 14.11.1908, Rio de Janeiro, Brazilio) estis la unua latva esperantisto kaj la aŭtoro de la unua Esperanto lernolibro por latvoj, eldonita en 1889.

Ĝus aperis lernolibro de Esperanto por litovoj de juna nova esperantisto Saulius Keras. Ĝi nomiĝas "Lengviausios kalbos vadovelis ESPERANTO" (Lernolibro de la plej facila lingvo ESPERANTO). La libro aperis en 1000 ekzempleroj. Ĝi konsistas el 30 lecionoj kaj ampleksas 224 paĝojn.

fonto: ret-info

La regiono de Kivu havas multajn gentojn/etnojn. En la norda Kivu loĝas gentoj/etnoj nomitaj "Dande-oj", "yima-oj", ktp. Aliaj troviĝas ĉirkaŭ Ugand-limo ĉirkaŭ Butembo teritorio. Flanke, en suda Kivu ankaŭ loĝas gentoj nomitaj "Shi-oj" el urbo Bukavu, "Rega-oj" el urbo Burega, "Fuliroj" el urbo Uvira, "Bemboj" el vilaĝo Fizi. Sciu, ke Fizi kaj Uvira troviĝas je Tanganyika lagbordo.

Mia naskiĝregiono estas riĉa je mineraloj, kaj ankaŭ havas belan naturon kun montoj kaj multaj riveroj. La mapo montras unu el la grandaj parkoj de Kongo, Kahuzi Biega. Fizi kaj Uvira estas plej bonaj fiŝkaptadoj.

Kvankam Kongo estas riĉa lando, popoloj en tiuj montaraj teritorioj vivas modeste kaj ĉiam suferas. Oni dependas je agrikulturo kaj fiŝkaptado. Ĉiam estas malfacile por vilaĝanoj kaj urbanoj vojaĝi kaj atingi iun ejon, kiam marvojo aŭ landvojo estas sole uzebla. Ekzemple de Fizi al Uvira estas pli atingebla per boato ol per landvojo kaj de Goma al Bukavu estas nur atingebla per lagvojo. La distanco inter Baraka (Fizi) kaj Uvira estas nur 65 kilometroj, sed oni bezonas 12 horojn por atingi ĝin, pro malfacila transporto.

PRI LA REGIONO DE SUDA KIVU, EN KONGO
KAJ PRI LA JUNULARO DE KONGO

Aŭtoro : Benjamin Nyemya (prilaborita kun Magali von Blottnitz)

La regiono de kie mi venas nomiĝas Suda Kivu-o, en Orienta Kongo. Ĝi estas unu de la ok vastaj provincoj de la Demokratia Respubliko de Kongo (DRK), kiu estas la dua plej vasta lando en tuta Afriko. Tiu lando certe estas tre vasta kompare kun aliaj landoj el centra Afriko, ekzemple la orientaj najbaroj Ruando, Burundo, Ugando kaj Tanzanio.

Mia denaska regiono havas multajn lagojn, kiujn oni povas vidi sur la mapo. Ili apartigas Kongon de la supre menciitaj landoj. Bone konata estas la Tanganyika lago, kiu disigas Burundon kaj Tanzanion de la kongaj teritorioj Uvira kaj Fizi. Simile, la 'Kivu lago' disigas Ruandon de du provincoj el Kongo: Goma kaj Bukavu. Historie tiuj du regionoj (norda kaj suda provincoj de Kivu) iam troviĝis kune; ambaŭ nomiĝis Kivu. Nun ili estas apartigitaj, kaj Bukavu estas la suda ĉefurbo, dum Goma estas la norda ĉefurbo de Kivu.

Novaĵo el Sud-Ameriko

Esperanto en la bibliotekojn!

En la kadro de la kampanjo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (el Rio de Janeiro) 'Esperanto en la Bibliotekojn' estis ekspedita pakaĵo, entenante dek tri librojn en Esperanto, al S-ano Cherarak Ali, en Wilaya de Bouiri. Ekde la komenco de la kampanjo pli ol 300 libroj estis donacitaj al 22 enlandaj kaj 6 alilandaj bibliotekoj. La kampanjo estas subtenata de libervolaj mondonacoj de deko da samideanoj el Rio de Janeiro kaj ĉirkaŭaĵoj.

Aloisio Sartorato
fonto: ret-info

Estimataj samideanoj:

Mi havas la plaĉon informi ke nova numero de Perua Esperanto Bulteno estas legebla ĉe <http://www.geocities.com/amikoj>

Amike,
Julio E. Zevallos Gómez

Novajo el Afriko

Esperanto en Kongia Gazeto

La gazeto por instruistoj de la katolikaj lernejoj en Kinŝaso, Kongo, en ĉiuj numeroj de januaro, februaro kaj marto 2004-a havas artikoletojn pri Esperanto, inkluzive de la deklaro de UEA pri la tago de gepatraj lingvoj.

fonto: ret-info

Helpu novan edukon centron!

Dialundama Michel, prezidanto de Braza Esperanto-Centro, en la urbo Braza en Kongo, kontaktis instruajn instancojn de la ministerio pri edukado, kaj sukcesis pri tio, ke la Braza Esperanto-Centro estis akceptata kiel eduka centro.

La edukaj instancoj petas ke la Centro havu bibliotekon por kontribui al la eduko de la civitanoj de la urbo Braza.

La laborantoj en la franca kultura centro (CCF-Brazza) akceptis ekspozicii en la centro librojn kaj gazetojn kiuj parolas pri Esperanto se ili estas en la franca. Povas temi ankaŭ pri lernolibroj. Tiucele ni tre dankas la esperantistojn, kiuj povas sendi al ni materialojn pri Esperanto en la franca.

fonto: ret-info

6. Revuo "Bona Espero"

La temo estis pritraktata per laborgrupo dum la kongreso. La ĉeestantoj de la jarkunveno petis la estraron efektivi tiurilatajn proponojn.

7. Elekto de komitato kaj estraro

La sekvaj estraranoj estis elektitaj:
Prezidanto: s-ro Julian Cloete
Kasisto: s-ro Colin Beckford
Sekretario: s-ro Johan Kohler
Vic-prezidanto: s-ino Magali von Blottnitz

Kandidatiĝis 8 homoj kiel komitatoj. El tiuj elektiĝis kiel komitatoj:

Axel von Blottnitz, Jozefo Katunda, Bernard Londoni, Elisee Byelongo, Benjamin Nyemya kaj Oskaro Sher.

8. Venonta jarkunveno kaj kongreso

Propono, ke en 2006 okazu jarkunveno kaj kongreso en la Okcidenta Kabolando estis akceptata. Venonta jarkunveno okazu en Gaŭtenga regiono, kaj tagon antaŭ ĝi okazu eble trejnseminario pri interreta uzado de Esperanto.

Ankaŭ la prezidanto raportis pri agadoj dum la jaro. Aparte li menciis la konkurson kaj instruadon. La prezidanto dankis al ĉiuj kiuj instruis pasintjare. Demando venis pri la dua gajninto de la premio en 2002/3.

La memronombro nun estas 35. Dum la pasinta jaro oni forstrekis 11 dumvivajn membrojn, kiuj certe ne plu rilatas al la asocio.

3.2 Financa raporto

La kasisto komentis la financajn rezultojn, kiujn li priskribis kiel "kontentigaj".

La jarraportoj de la prezidanto kaj kasisto estis aprobitaj kun dankesprimoj. Unu de la nepartoprenintoj voĉdonis ne akcepti la finanĉan raporton, sed ne donis klarigon. Oni petu lin klarigi sian kialon.

4. Ŝanĝo de la Statuto

S-ro Cloete klarigis la kialon de la ŝanĝoj al la statuto kaj ĝenerala regularo. Oni petis al d-ro Harro von Blottnitz aktualigi la esperantan tradukon. Oni unuanime voĉdone akceptis la ŝanĝojn al la statuto. Estis iom da diskuto pri punktoj 3a, 3b kaj 5a en la ĝenerala regularo kiuj ne estis tute klaraj. Oni unuanime akceptis ke en punkto 3a, la averta periodo estu 28 tagoj.

5. Ratifo de Manifesto pri Lingvaj Rajtoj

Estis klarigaj diskutoj pri la manifesto kaj pri ĝia rilato al nia konstitucio. Poste oni unuanime voĉdone akceptis

La 11-a Togolanda E-kongreso (TEK)

De la 27-a ĝis la 29-a de decembro 2003 la landa asocio en Togolando okazigis en la urbo Aneho sian 11-an naciajn kongreson kun la partopreno de ĉirkaŭ sepdek partoprenantoj El Togolando, Benino kaj Niĝerio. Okazis tiam ankaŭ la Zamenhoffesto 2003, kiu tiel rolis kiel la antaŭkongreso.

La 27-an de decembro 2003 pli ol kvindek Esperantistoj venintaj al ĉiuj anguloj de Togolando celebris la Zamenhoffeston en la urbo Aneho. Ĉeeestis la feston ankaŭ Esperantistoj el Niĝerio kaj Benino: paroladoj, muziko, kunmanĝo kaj futbalmaĉo movis la partoprenantojn. Kvankam la futbalteamo Esperanto de UTE malvenkis, la Esperantistoj tamen ĝojege en la vespero ekkazigis la 11-an TEK. La unua komitatakunsido lanĉis la kongreson.

La 28-an de decembro okazis la inaŭguro de la kongreso kun ĉirkaŭ sepdek homoj. La ĝenerala sekretario de la urbestro malfermis la kongreson. Reprezentantoj de FTACU, TEJO kaj UEA partoprenis la aranĝon. Aliaj eroj (ĝenerala asembleo, prelego pri la kongresa temo, internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI, kvizo, ktp.) sekvis la inaŭguron, kaj la 29-an de decembro fermiĝis la kongreso.

La 12-a Togolanda Esperanto-Kongreso okazos de la 26-a ĝis la 28-a de decembro 2004 en la urbo ANEHO, ĉemara loko ege gastama, kaj en kies ĉirkaŭaĵoj

ĝin. Ĝi aperu en "Bona Espero".

- 24 -

multas Esperantistoj.

GBEGLO Koffi, B.P. 13169, Lome, TOGOLANDO, fonto:
ret-info

- 13 -

Novajo el Azio

Antaŭ ne longe aperis monata retgazeto "Amikeco" de koreaj, vjetnamaj, japanaj kaj ĉinaj junuloj. La numeroj legeblas ĉe: http://www.syever.com/amikeco/03_tria/03_amikeco.html .

En la Ĉina Universitato de Administro kaj Softvaro en Pekino, la 13-an de marto, 2004 startis E-kurson por komencantoj, en kiu partoprenas pli ol 80 gestudentoj el la Fakultato pri Turismo Internacia.

La kurson gvidas s-ro Cui Jiayou, rete: cuijiayou@yahoo.com.cn .

Protokolo de la 41a Jarkunveno de EASA

1. Formalaĵoj

La kunvenon prezidis s-ro Julian Cloete. Protokolis d-ro Harro von Blottnitz. Krome ĉeestis la kunvenon: s-ro Colin Beckford, s-ro Axel von Blottnitz, s-ro Jozef Katunda, s-ino Rosina Khoza (gasto), s-ro Johan Köhler, s-ro Clement Mokone, s-ro William Sampewi, s-ro Oscar Sher, d-ro Jan Strydom, ges-roj Tony kaj Bianca Thornton.

Anticipe sendis komentojn: s-ino Magali von Blottnitz kaj s-ro Hassan Yaye. S-ro Elisee Byelongo pardonpetis kaj transdonis voĉpovon al s-ro Johan Kohler.

La protokolo de la antaŭa jarkunveno (2003-05-18 en Johanesburgo) estis aprobita.

2. Aprobo de la Tagordo

La tagordo, kiel montrita en tiu ĉi protokolo, estis aprobata. Estis demando, ĉu oni diskuti subskribpovojn, sed oni decidis, ke tiu estas afero por la estraro.

3. Raporto de la Estraro

3.1 Raporto de la prezidanto

La prezidanto laŭtlegis lian jarraporton. Li aparte dankis al la sekretariino, s-ino Magali von Blottnitz pro farita laborego, kaj ankaŭ al s-ro Axel von Blottnitz pro la organizado de tiu ĉi kongreso.

Maljunula laborgrupo

La maljunuloj diskutis la taskojn por la estontenco de EASA (ni ankaŭ diskutis dum la komitatkunveno):

1. Varbado (inkluzive Presado)
2. Redaktoro
3. Arhivo
4. Eksterlandaj Rilatoj (ekster Sud-Afriko)
5. Eksteraj Rilatoj (Kun frataj asocioj en Sud-Afriko)
6. Instrudado (inkluzive la Konkurso kaj Varbado)
7. Administrado
8. Lokaj grupoj

Poste, la maljunuloj diskutis la celmerkaton por Esperanto en Sud-Afriko, kaj ĉu ni atingis ĉi tiun celmerkaton. Ni proponis ke ni devos koncentriĝi ĉe universitato (aŭ kun studentoj aŭ eĉ kun lektoroj).

EASA Marta Subkontinenta Kongreso

La Kongreso apud Roodeplaatsdamo, Pretoria, Sud-Afriko okazis de la 19a de Marto ĝis la 23a de Marto, 2004. Skribataj bondeziroj venis de multaj Esperantistoj kaj Asocioj tra Afriko kaj de Eŭropo. Dum la kongreso, la kongresanoj partoprenis en laborgrupoj, prelegoj kaj la jarkunveno de la Esperantao-Asocio de Suda-Afriko.

Notoj pri la Laborgrupaj diskutoj

Instru- kaj Varbadmaterialoj

Pri varbadmaterialoj:

Mendo de afrikansaj broŝuroj estu finota - pli granda kvanto (4000 entute). Ni havas buĝeton. [Magali]

Venontjare, ni presu zululingvajn informilojn. Unuan tradukon de "Speak to the World" organizu Johano (kaj eble antaŭe Clement kun Harro), poste oni sendu la tuton al Simon Donnelly kun peto trovi kapablan studentan tradukiston por kontroli tiun kontraupage. Sama tradukisto estu petata prilabori « An Easy Language »i laŭ la zulusa strukturo. [Harro prizorgu]

Pri instrumaterialoj :

Oni faris sumsumon de lerniloj nun uzataj, inkluzive Saluton, Practical Course de Szilagy, Mazi en Gondolando, Kurso de Esperanto, Esperanto de

Downes, Jen Nia Mondo, Teach Yourself, Afrikansa
Lernolibro, Privelegia Vojo kaj Step by Step.
- 15 -

Poste oni identigis la problemojn de la nuna situacio :

- Lernantoj ofte ne havas monon aceti lernmaterialojn ;
- Kelkaj ne scias kiel autodidaktaj libroj povas esti uzataj por instruado ;
- Ne ekzistas vortlistoj en sudafrikaj lingvoj krom en la afrikansa ;
- Ne ekzistas kursoj surbaze de la sudafrikaj lingvoj krom la afrikansa ;
- Ne ekzistas esperanto vortaroj por la sudafrikaj lingvoj;
- Eble oni uzas tro multajn diversajn lernilojn.

Proponoj:

- 1) Julian / Oskaro / Johan esploru la eblecon akiri rajton por (kaj datumaron de) iu vortlisto sudafrika, kiu listas vortojn en multaj sudafrikaj lingvoj (ekz. tiun 6-lingvan de Reader's Digest). Se eblas, oni povus distribui la laboron de la aldonado de esperanto-vortoj. [Grava projekto]
- 2) La vendumado de la afrikansa lernolibro estu plibonigata [Harro]
- 3) Johan esploru tradukon de "Kurso de Esperanto" en sudafrikan lingvon.
- 4) Axel donu la tekstojn de zulu vortaro al Johano, kiu serĉu taŭgan tradukiston, kiu prilaboru ĝin antaŭeldone.

La Estonteco de EASA

Junula laborgrupo

Estis diskutataj diversaj temoj. Oni proponis:

1) EASA, eble kun subteno de TEJO, povus oferti trejnadon por junuloj (kaj aliaj?) pri reta korespondado kun aliaj esperantistoj, kaj aliro al esperantlingvaj retaĵoj.

2) Oni kreu ret-liston por junuloj "EASA-junuloj", kun membroj kiel montrata en la sekvanta tabelo:

Nomo	Retadreso	Mobila numero
Johano	kohlerj@webmail.co.za	083 559 3156
William Sampewi	sampewi@webmail.co.za	082 835 3972
Jozefo Katunda	jrkatunda@yahoo.com	072 538 1336
Clement Mokone	Sen retadreso	011 980 2057
Magali	hvb@mweb.co.za	072 179 2994
Benjamin Nyemya	erickabwe@yahoo.com	072 691 2775
Mahilo Walushi	mahilow67@yahoo.com	072 347 9693
Elisee	byelongo@webmail.co.za	072 597 8754
Jozefo Yaye	yaye@webmail.co.za	072 512 7196

Kie renkontiĝi?

Elekto de taŭga loko tre gravas. Estis la sekvaj proponoj, bazite de spertoj de partoprenintoj:

- private ĉe riĉulo ;
- en restoracio, au eĉ rapidmanĝejo (MakDo) ;
- en oficejo de alia organizaĵo ;
- ekstere, ekz. en parko

Loko devas esti sekura (ekz. por lasi aŭtojn).
Bona loko permesas la alportadon de propraj manĝaĵoj.

Kio pri transporto?

La ejo devas esti facile atingebla! Laŭeble ĝi estu centre situata.

Nyaniso	sen retadreso	nekonata
Max Rabkin	maxr@telkomsa.net	nekonata
Morne van der Merwe	13659529@sun.ac.za	083 715 9363
Maringe ? prizonulo	???	???
Rosina Khoza komercantino	sen retadreso	072 538 1336

- 5) Johan esploru la eblecon produkti frazaron sudafrikan per de Travlang.
- 6) Axel pensu pri kontrolado & produktado de afrikansa vortaro (la vortaro de S-o Wiegand).
- 7) EASA pripensu inviton al sperta esperantisto por 2006a kongreso, kiu instruu instruontojn (tiu estis diskutita sub punkto loka agado).

Bona Espero

Julian bezonas kontribuojn. Inter alie, estis proponata poemoj (William Sampewi) limdatoj por kontribuajoj estu komunikotaj! [Julian}

Uzado de la gazeto ne nur por interna informado, sed ankaŭ ĝi servu kiel 'vizitkarto':

- ĝeneralaj informoj pri EASA en naciaj lingvoj sur la dorsflanko
- de tempo al tempo traduko de unu artikolo (?)

Ĝi daŭre aperu papere (malgraŭ jaraj kostoj de preskaŭ R 2000). Sed elektronika kopio ankaŭ estu metita sur la retpaĝaro de EASA (malnete sufiĉas). Regula apero de kolumno pri libroj en la asocia biblioteko Helpredaktoro, kiu entajpas manskribitajn tekston (Axel)

Por plirapidigi la kontroladon de BE, Harro transprenu tiun taskon kaj faru ĝin rekte perrete. Bv. sendu al hvb@chemeng.uct.ac.za. Ĉu Magali havas dosiere la adresetikedojn? Se Julian aŭ Colin tiun bezonos, ili petu de ŝi. La nova sekretario tiun zorge transprenu!

Eksteraj Rilatoj

Afrika oficejo:

Oni per tiu oficejo avertu landajn sekciojn pri apero de nova B.E., havebla de nia retpaĝaro.
Al Oliver Madzodze oni sendu paperan version.

Afrika komitato:

Johan membras.

Afrika kongreso:

Johan eltrovu detalojn pri la venonta. Komuniku al la membraro (Bona Espero ?)

UEA kaj TEJO:

Colin restas Cefdelegito. Neniu grava raportinda. Colin, Axel, Harro (Magali, Oskaro kaj Elisee) estas delegitoj. Elisee cijare ne plu listigas. Jarkotizo al UEA estas (nur) R 121.

Clement ricevis mesaĝon de François Hounsounou (TEJO kunordiganto pri landaj sekcioj?) rilate al junula agado en sudafriko. Diskutenda!

Pasporta Servo:

Ĉifoje Sudafriko havas nur 3 gastigantojn (Magali kaj Harro kaburbe, Elisee durbane kaj Clement sowete).

La libro aspektas multekosta, sed eĉ unu nokto malhotele ŝparos pli da mono! Aĉetu (nur) se vi eksterlanden vojaĝos!

Nia sekretario restu en kontakto kun la PS-kunordiganto kaj informi membrojn pri limdatoj por listigo.

Loka Agado

Estis kelkaj demandoj pri agadmanieroj kaj reguloj rigarde al la funkciado de lokaj kluboj:

Reguloj rilate al EASA:

Loka klubo povas esti tute sendependa, sed kaze ke ĝiaj membroj ankaŭ membras en EASA, la 10a punkton de la generala regularo de EASA gravas. Oni legis kaj klarigis ĝin. Estis klarigita, ke klubo rajtas reteni duonon de la membrigaj pagoj de siaj klubanoj al EASA.

Axel sugestis, ke Esperanto klubo havu tri devojn:

- filiaga pago (ne veras, vd. supre);
- meti Esperanton en telefonlibron;
- meti sian nomon en urban kluboliston.

Kiam renkontiĝi? / Kion fari dum kunvenoj?

Tre taŭga estas renkontigo kiam vizitas eksterlanda gasto.

Krom tio, lauelekte. Eble monate, dimanĉposttagmeze.

Iu havas libron de taŭgaj ludoj. (Julian?)

